



Boletín

n° 410 Aprilo - Junio 2015



Asociación de utilidad pública

Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 410

Redakto-skipo
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.

Revizio: Alejandro Pareja

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj

* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7
ES-28015 Madrid
admin@esperanto.es
Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31
0204011961

Poŝtelefono: +34 638 547 104
Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon
en la aŭtomata responddilo)

Estraro

Prezidanto: José Antonio del Barrio
Vicprezidanto: Ángel Arquillos López
Sekretario: Félix M. Jiménez
Kasisto: Raúl Mtnez. Anguita
Voĉdonantoj: Eduardo Berdor
Juan José Vera
Jesús García Cano

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)
DL: M-39811-2012

Salutvortoj

Karaj amikoj.

Estas tempo de renkontoj kaj kongresoj, kaj en tiu ĉi numero de nia Bulteno vi trovos plurajn informojn pri la temo.

Unue, ni parolas kompreneble pri nia landa kongreso. Varia grupo de samideanoj, laŭ aĝo kaj deveno, ĝuis belan kaj amikan etoson en la komenco de majo, en Cullera. Ni volas danki la valenciajn amikojn pro ilia akceptemo kaj laboremo. Pri la disvolvo de la kongreso kaj pri la decidoj de la ĝenerala kunveno de HEF vi povos legi en sekvaj paĝoj, sed ni volas bonvenigi du novajn membrojn de la estraro, Álex kaj Águeda, kiuj akompanos nin dum tiu ĉi venonta jaro.

Vi ankaŭ trovos novaĵon pri la venonta kongreso, jam en 2016. La Estraro decidis akcepti la inviton de la ekstremaduraj samideanoj, kaj aprobis la okazigon de la 75-a Hispana Kongreso en Herrera del Duque, en provinco Badajoz. Pri tio vi legu poste.

Pli proksime, oni ne povas ne menciŭ la baldaŭan okazigon de internaciaj someraj renkontoj. Unue kompreneble la Universala Kongreso, jam la 100-an, kiu kunvenigos en Lillo plurajn milojn da gastoj, kaj dum kiu okazos omaĝo al nia unua UK kaj al la tiamaj pioniroj. Ankaŭ la SAT-kongreso en Slovakio altiros samideanojn inter kiuj pluraj el nia lando.

Post la somero ankoraŭ restos tempo por ĝui la Internacian Semajnon de Kulturo kaj Turismo, ĉifoje en Roses, en la “Costa Brava”, kiel ĉiam komence de oktobro. Kaj dum la unuaj tagoj de novembro estos la tempo de la Andaluza Kongreso, kiu okazos en Jerez de la Frontera, kaj kiu antaŭvidiĝas tre interesa, pro la temo elektita kaj la kulturaj kaj turismaj allogaĵoj de la loko kiu nin gastigos.

Ne mankas do okazoj por ĝui la esperantan kulturon kaj la amikemon de ĝiaj parolantoj. Ni profitu ilin, ĉar tiel Esperanto vivas kaj kreskas.


José Antonio del Barrio

Enhavo

Salutvortoj	1
100-a Universala Kongreso	2
Ordinara Ĝenerala Kunveno	3
La Hispana Esperanto-Kongreso de Cullera 2015	5
La 75-a Hispana Kongreso de Esperanto en Herrera del Duque	8
Junulara Agado	11
Informoj pri la projekto “Dua Kifoto”	12
Pluaj kontaktoj rilate al UNESKO	13
Sep miljarde da revoj	14
Elektofiŝoj en Esperanto	15
400a Datreveno de la dua parto de Don Quijote de la Mancha	16
Pri grupoj kaj asocioj	19
Lingva Angulo	22
Poezia angulo	24
La 31-a PSI Winterberg	26
23 Internacia Semajno de Kulturo kaj Turismo / Aktivejoj Gresiljono	27
SAT-Kongreso en Nitro	28
La fonto de la Esperanta Grupo “Lumradio” Cheste	29
Dua konkurso pri rakontoj “Los Pinos del Retiro”	30
Lasta-hora novaĵo pri esperanta muziko	32

Ĉefpaĝo: Nia verda superheroo “Heroo” (Youngung Kim) inter du novaj estraranoj de HEF
Dorsopaĝo: Scenoj de la 74-a Hispana Kongreso en Cullera. Fotis: Denver kaj Diego Harrison.

100-A UNIVERSALA KONGRESO



La 100-a Universala Kongreso en Lille, Francio, inter la 25 de julio kaj la 1 de aŭgusto 2015, sub la devizo "Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturo"

Komence de junio jam estas aliĝintaj pli ol 2300 personoj el 81 landoj, inter kiuj ĉ. 50 el Hispanio. Ĉiuj informoj en <http://www.lille2015.fr/> kaj <http://uea.org/kongreso/UK>.

Hispana Esperanto-Federacio partoprenos la kongreson per budo en la Movada Foiro kiu disvolviĝos la unuan tagon de la programo. Vizitu nin!

ORDINARA ĜENERALA KUNVENO

La 3-an de majo 2015 je la 10:00 horo (dua alvoko) okazis la Ordinara Ĝenerala Kunveno en la “Casa de Cultura” de Cullera (Valencio). Ĉeestis la estraranoj: Eduardo Berdor (voĉdonanto), Félix Manuel Jiménez (Sekretario), Ángel Arquillos (vicprezidanto) kaj José Antonio del Barrio (Prezidanto), kiu prezidis la kunvenon. Partoprenis ankaŭ 15 individuaj anoj kaj 5 kolektivaj membroj (Fratego el Zaragozo, Kantabra E-Asocio, Andaluzo E-Unuiĝo, Kultura Asocio Esperantista kaj Madrida E-liceo) reprezentataj de kvin el la ĉeestantaj individuaj membroj, entute 25 partoprenantoj. La sesio disvolviĝis laŭ la jena tagordo:

1.- Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (4 majo 2014).

Oni aprobis unuanime la protokolon de la antaŭa kunveno.

2.- Parta renovigo de la Estraro.

Alejandro Escobedo estas elektita kiel nova voĉdonanto anstataŭante Jesús García kaj li reprezentos HEJS en la estraro, ĉar li estis aprobita kiel prezidanto de HEJS antaŭ kelkaj semajnoj. La estraro proponis ankaŭ la nomumon de vicsekretario, kaj ni elektis Águeda Biurrun por tiu tasko.

La prezidanto rimarkas, ke venontjare finiĝos la mandato de la nuna estraro (2012-2016) kaj oni devos elekti novan. La anaro devos pripensi kandidatojn ĉar kelkaj homoj de la nuna estraro ne rekandidatiĝos (ekz. la propra Prezidanto kaj la Sekretario).

3.- Aprobo de la kontoj kaj kas-stato de 2014.

Post kelkaj klarigoj pri la kontoj far la Prezidanto, la kontoj, prezentitaj en la Boletín n-ro 409, estis aprobitaj unuanime.

4.- Aprobo de la Raporto pri aktivaĵoj de 2014.

La raporto, prezentita en la Boletín n-ro 409, estis aprobita unuanime.

5.- Informo pri la anaro.

Aniĝantaj je la dato 31-a de decembro 2014 (maksimume ŝuldas du jarkotizojn):

Individuaj (OM, DM, PM kaj HM): 195 (el kiuj 7 apartenas al la junulara sekcio HEJS)

<u>Kolektivaj:</u>	<u>17</u>
ENTUTE:	212

La Sekretario klarigas, ke pro malkongruo inter du datumbazoj (tiu de la sidejo de HEF kaj tiu de la librotenado) la anoj estas 35 pli ol ni informis en la pasinta Ĝenerala Kunveno (la datumo de 2013 estis entute 165 anoj). Do, estas bona novaĵo kaj tial la nombro de anoj estas ĉirkaŭ 200 dum la lastaj 10 jaroj.

6.- Aprobo de la Agadlinioj 2015.

La Prezidanto klarigas la agadliniojn proponatajn por la jaro 2015, kiuj aperis en la Boletín n-ro 409. Post tio, la agadlinioj 2015 estis aprobitaj unuanime.

7.- Aprobo de la Buĝeto por 2015.

Post eta modifo, kiu estis specife rezevi por HEJS 200 € por propra agado el la parto “Otras campañas”, la Buĝeto, prezentita en la Boletín n-ro 409, estis aprobita unuanime.

8.- Kotizoj por la jaro 2016.

Oni aprobas modifon por la kotizo de Ordinaraĵ Membroj (OM): tiuj OM, kiuj petos ne ricevi papere “Boletín” kaj volos ricevi ĝin nur interrete, pagos nur 30 €/jare. La restantaj kotizoj por 2016 restas same ol tiuj de 2015.

9.- Sugestoj kaj demandoj.

Hispana Kongreso 2016: Esta proponata Herrera del Duque (Badajoz, Ekstremaĵuro) kiel kongresurbo 2016 far la ano Javier Romero. Li proponas fari ĝin la unuan semajnon de julio 2016. La Estraro studos la proponon kaj decidus antaŭ la fino de junio de 2015.

Ricardo Biurrun sugestas pli bone atenti la novajn anojn: ekzemple, li aliĝis al HEF antaŭ monatoj kaj ĝis nun nek ricevis Boletín, nek ian bonvenigon. La estraro studos la aferon, ĉar devus temi pri eraro, sed ĉiukaze pretigos bonvenigan dosieron ĝenerale por novaj anoj.

Estis proponite ke HEF pretigu ian diplomon laŭ niveloj A1 kaj A2 laŭ Eŭropa Referenckadro por la lernantoj de la grupoj. Oni komisiis al la estraro aŭ instrua fako por studi la eblecojn.

Sen pli da aferoj por pritrakti, finiĝas la kunveno je la 12:00 horo.

La Prezidanto

José Antonio del Barrio Unquera

La Sekretario

Félix Manuel Jiménez Lobo

SINPRESENTO DE NOVA ESTRARANO DE HEF

Águeda Biurrun

Mi naskiĝis en Madrido en 1953. Mi laboras jam pli longe ol kvardek jarojn, ĉiam kadre de publikaj sanservoj; ekde 1986 kiel respondeculo de madrida sennoktada malsanulejo pri mensa sano.

Mi eklernis Esperanton en 2013, kaj ĝi tuj ravis min. Mi havas la fortunon kalkuli je mia frato Ricardo, esperantisto jam delonge, kiu helpis (kaj helpas) multe al mi.

Mi partoprenas la madridan lokan movadon kaj nune mi pretigas gvidatan promenadon tra la urbo Madrido kun ĝiaj antikvaj anekdotoj.

Mi estas nov-bakita esperantistino, sed mi deziras meti mian sablereton por puŝi iomete al Esperanto antaŭen per mia kunlaborado ene de la Federacio.



LA HISPANA ESPERANTO KONGRESO DE CULLERA 2015

Jen kelkaj ideoj kaj memoroj pri la ĵuse okazinta Hispana Esperanto-Kongreso. Mi ne intencas fari protokolon kaj tute objektivan resumon. Mi ĉefe povas atesti pri tio, kion mi travivis.

Alia Hispana Kongreso malantaŭ ni. Tempo pasas rapide. Por kelkaj, ĝi estis la unua kaj espereble multaj aliaj E-renkontiĝoj sekvos. Multaj junuloj venis unuafoje al hispana kongreso en Arundo la pasintan jaron. Bedaŭrinde ne ĉiuj revenis, sed oni povas preni en konsideron la situon de Cullera en Hispanio. Mi atingis la kongresurbeton iom malpli frue ol estus dezirinde. La mateno estas la momento de revidoj kaj salutoj. Oni proponis rondajn pilkajn ludojn por interkonatiĝo. Filmetojn pri kosmoesploro kaj pri la iama kosmokonkuro inter Usono kaj Sovetunio oni montris al la ĉeestantoj. Ni nelonge debatis per interŝanĝo de malsimilaj ideoj.

Mi montris aliajn filmetojn pri humuro fare de/pri virinoj, turkaj kaj francaj superstiĉoj kaj fine tĉemizoj. Per demandoj, la ĉeestintoj opiniis kaj amuziĝis. Nia kara Tonyo del Barrio prelegis pri Donkiĥoto je la trimila fojo, pardonu, Tonyo, hehe. Fakte, temis pri diversaj historiaj eldonoj en Esperanto. La 2015a jaro signas la 400an datrevenon de la eldono de la dua parto de la romano. Krome, M. G. Adúriz faris atelieron pri kantoj, en kiu mi ne povis partopreni sed kiun mi sendube baldaŭ povos spekti en lia jutuba kanalo. Aldone, Ana Manero parolis al ni pri la novaj progresoj de Bitoteko kaj ĝiaj rilatoj kun Eŭropeana... kaj laŭ la demandoj pri bibliotekoj kaj katalogado de libroj ĝenerale. Bedaŭrinde ŝia prelego koincidis kun alia prelego, kaj kongresanoj devis elekti aŭ konfuziĝis. Samtempe okazis la prelego de Javier Romero pri Esperanto kaj nova monda kulturo. Li mem prezentis kandidatiĝon por la organizo de la venontjara Hispana Kongreso en Ekstremaduro.

La unua vespero kunigis trinkaĵojn kaj manĝaĵojn venantaj de la devenregionoj aŭ landoj de la kongresanoj. Ĉiu alportinto klarigis pri la plado aŭ produkto unu post la alia. Dume ni parolis kaj interkonatiĝis. Malgraŭ la elstara manĝemo de la homoj, ni ne sukcesis entute ĉion manĝi. Venis manĝaĵoj de Germanio, Vjetnamio... (ĉu ankaŭ aliaj foraj landoj?) kaj la plimulto de la hispanaj regionoj.





Solena malfermo ne povis manki: la skabenino pri kulturo de la loka urbestro prezidis ĝin apud la prezidanto de HEF kaj la prezidanto de la LKK Enric Baltasar. Ŝi ricevis donacon por la loka biblioteko kaj laŭtradicie homoj iris surscenejen por saluti nome de X. Mi ĝoje konvinkis mian usonan amikon Denver saluti la kongresanaron Esperante.

Flama prelegis pri sia lando. Ŝi parolis pri nekredebla trafiko por nia eŭropa vidpunkto, pri inaj vestaĵoj kaj ĉefe pri manĝaĵoj (pladoj kaj bazaroj). Por nia movado estas honoro, ke ŝi deziris veni en Hispanion por studi en universitato kaj aldone por lerni la hispanan. Per ŝi mem, ŝi pruvas, ke Esperanto estas internacia lingvo, kiu ne limigas sin al okcidentlingvanoj. Same mi povas diri pri Heroo, kiun mi konas malpli bone. Mi devas agnoski, ke mi estus preferinta, ke li prelegu pri Koreio, anstataŭ pri aliaj aferoj. Tamen, li proponis interesajn ideojn pri movado.

La komuna bankedo estis sukcesa, ĉar la paelo estis bongustega. Ĝi okazis en loka trinkejo, ŝajne tre frekventata de lokanoj. Mi ŝategas tiajn grandajn fazeolojn, kiuj estas tipaj de la valencia paelo. Ni povis remanĝi laŭ nia deziro. Komence, la



televida komentado de piedpilka matĉo estis unu plia parolanto, sed kiam la matĉo finis, ni estis en pli kalma etoso. Nur kelkaj antaŭaj televidspektantoj restis, tute sensuspekte de la originala koncerto kiu estis okazonta. Jonny M ja surprizis min. Mi nur konis pri kantojn de li. Mi eltiris la konkludon,

ke ties tekstoj estis tre simplaj kaj, ke ties muziko similis por ĉiuj kantoj. Mi ege eraris. Li tre talente dancegis la homojn kaj eĉ havis senson de memridigo. Li konkeris la homojn per sia simpatio kaj rideto. Estis amuze vidi la kontraston kun la eksterkongresuloj, kiuj preteratentis la spektaklon.

Vetere, la suno akompanis dum la tuta kongreso. Termometroj montris somerajn tridekkelkgradajn temperaturojn kaj nuboj elmigris dum tiu semajno. La ruĝa kaj iom bruligita haŭto de kelkaj kongresanoj tion atestis. Ni vizitis la lokan kastelon kaj atingis ĝin per longa subsunega dekliva piedirado. Per videoj kaj klarigos ni eksiis, ke Cullera ekzistas de antaŭ du jarmiloj! La vido de tie super la urbo kaj la maro estis bela. Ĝi igis nin distingi la malsamajn partojn de la urbo laŭ historia disvolviĝo. Tuj post la vizito, apud la preĝejo kiu ankaŭ troviĝas sur la monteto, Vicent Lluís Gimeno, esperantisto el Sueca, prelegis pri astronomio. La aŭskultintoj malkovris kelkajn verojn pri tiu fako, kiujn ŝajne ili lernis malĝuste en lernejo: dezegnaĵoj kaj dezajnoj helpis kompreni ideojn pri horizonto, suneliro kaj sunforiro, la pozicio de la observanto kaj la astro, la sezonoj, ktp. Kelkaj revenis al la urbo aŭte aŭ per la irvojo. Aliaj, inter ili mi, sekvis la konsilon de iu loka taksisto: descendi tra la monteta flanko. Ĝi aspektis facila, sed por la malplej lertaj la subenirado ne tre facilis. Varmo, ŝtonoj, insektoj kaj eĉ figoj estis malamikoj. Sed je la fino ĉiuj sukcese atingis la celon.

Aliflanke, en la kongresejo la LKK okazigis modestan ekspozicion pri E-poŝtkartoj de fruaj Esperantistoj de Valencilando. Kortuŝis la tekstoj kaj sentoj de tiamaj verkantoj, kio memorigas al ni la vojon, kiun Esperanto jam sekvis tra jardekoj, militoj kaj ŝanĝoj.

Kvankam por kelkaj la kongreso finis en Cullera post la Ĝenerala Kunveno, aliaj prenis trajnon al Valencio. Mi esperas, ke ili bone promenis en la urbo, malgraŭ la manko de dormo kaj ia neatendita malbonfartiĝo.

Iel anekdote: Cullera ŝajnis malgranda, sed ni facile perdiĝis malgraŭ la helpo de tiaj modernaj poŝtelefonoj, pro tio ke la stratoj multe similas inter si.

Ĉu ni vidos nin en la 2016jara HK?

Eduardo Berdor



DECIDO PRI LA 75-A HISPANA KONGRESO

Karaj membroj de HEF:

Ni informas al vi ke la estraro de HEF, en kunveno de la 10-a de junio, decidis akcepti la proponon okazigi la venontan 75-an Hispanan Kongreson de Esperanto en Herrera del Duque, inter la 30 de junio kaj 4 de julio 2016 (kun eventualaj antaŭ- aŭ post-kongresoj, laŭ postaj interkonsentoj)

Herrera del Duque estas urbo en Ekstremaĉuro, ĉefurbo de regioneto konata populare kiel "La Siberio". La loko estas tre riĉa je naturaj havaĵoj. Krome, ĝi troviĝas sufiĉe proksima al Guadalupe kaj Mérida, kien oni planas organizi turismajn vizitojn.

Por alveni al tiu decido ni ekzamenis la proponon faritan de nia samasocio Javier Romero, kun la apogo de José María Salguero (Kani), kiuj sin proponis por gvidi la LKK-on. La antaŭan semajnfinojn du estraranoj, la prezidanto kaj la kasisto, vizitis la urbon, ekzamenis la proponitan kongresejon (tre taŭgan Kulturcenton) kaj aliajn eblajn kongreslokojn, interparolis kun kvar magistrataroj, kaj diskutis la praktikajn aspektojn kaj la eblan programon. Nia impresoj estis tre pozitivaj, ĉefe pri la sinofero de la organizantoj kaj de la urbodoma instancoj.

Ni decidis viziti la urbon antaŭ ol preni definitivajn decidojn, pro iaj timoj montritaj, pro la relativa malgrandeco de la urbo kompare kun ĝisnunaj kongresurboj, kaj pro la famo kiun ĝi havas pri malfacila alirebleco (al kiu la nomo de la komarko parte aludas). Ni tamen konstatis ke ĝi havas sufiĉe da gastigeblecoj kaj la necesajn infrastrukturojn por la bezonoj de nia kongreso. Krome, ni konfirmis ke ĝi estas facile atingebla ekzemple el Madrido, el kie HEF provos organizi komunan transporton, se necese, por homoj venantaj el la orienta duono de la lando kaj el ekster Hispanio. Ankaŭ atingas ĝin sufiĉe bonaj ŝoseoj por homoj el aliaj regionoj.

Speciale konvinkis nin la sinteno de la urbaj aŭtoritatoj. Ni alvenis en la semajno post la municipaj balotoj, sed ricevis nin eĉ kvar magistrataroj, unu el ili la antaŭa respondeculo pri kulturo kaj tri el la baldaŭ enposteniĝontaj, kiuj montris grandan apogon al la okazigo de la Kongreso.

En apuda artikolo vi trovos la unuajn ideojn kaj planojn. Dum venontaj monatoj ni daŭrigos la planadon, kaj informos ĉiujn anojn kaj ĉiujn esperantistojn pri la decidoj, sed ni jam volas fari alvokon al la partopreno en la programo, kaj ĝenerale en la kongreso.

Ni havas sufiĉe da tempo por krei bonan kongreson. Ni tre esperas ke ĝi bone sukcesos.

La estraro

La 75a Hispana Kongreso de Esperanto okazos somere en Herrera del Duque



Inter la 30-a de junio kaj la 4-a de julio 2016, Herrera del Duque gastigos la 75an Hispanan Kongreson de Esperanto.

Jes, kara samideano, vi legis bone. La venonta Hispana Kongreso de Esperanto okazos en Herrera del Duque, provinco de Badajoz la ĉefurbo de la komarko "Siberia", en la orienta parto de Ekstremaduro. Kaj estus por ni granda honoro se vi decidus veni kaj partopreni en ĝi.

De tempo al tempo etaj mirakloj okazas. Kaj jen ni vidas unu el

tiuj etaj kaj neatenditaj mirakletoj. "Kie estas Herrera del Duque?", vi jam demandis vin. "Kial tie?". "Ĉu ĝi estas interesa kaj turisma urbo?" "Ĉu ĝi ne estas pli vilaĝo ol urbo?" "Ĉu tie estas hoteloj, rezidejoj, granda kongresejo?" "Ĉu la estraro de HEF bontrafis elektante Herrera del Duque'n kiel kongresan urbon por la venonta jaro?"

Jes, kara samideano, la demandoj svarme fontas de via menso kiel versoj ibere libere.

Esperanto jam estas miraklo en si mem. Ĝi naskiĝis el la boneco de unu homo. Kaj ekde pli ol 128 jaroj, la verda standardo multe flagris en centoj da landoj tra la tuta mondo. Esperanto, la neŭtrala lingvo de internacia interkompreniĝo, naskita por esti iam la lingvo de la tuta homaro

trovis bonan grundon en Herrera del Duque. Jes, la ondo de Esperanto atingis la hispanan Siberian kaj ĉi tie la verda semo kreskas malrapide sed sekure kaj forte.

Ekstremaduro estas loko de kontaktoj. Ekzemple inter Kastilio kaj Andaluzio, inter Portugalio kaj Hispanio, kaj inter Hispanio kaj Ameriko. En Ekstremaduro naskiĝis la Ibera Skolo (Merido, 1992), kiu nun havos la okazon reveni al la naskiĝloko.



La kongreso havos kiel moto *Ekstremaduro: limejo kaj interligejo*

"Extremadura: tierra de fronteras y contactos".

La Kultura Palaco de Herrera del Duque estas la baza sidejo de la kongreso, moderna konstruaĵo, kiu disponas je ĉiuj necesaj rimedoj por la okazigo de la kongreso: salonoj, kunvenĉambroj, ripozejoj, kaj luksega teatro kaj spektaklejo, kie ni atendas revivi novan version de *Vivu la teatro!*

Herrera del Duque estas urbeto en la provinco Badajoz, kiu havas iom malpli ol 4.000 enloĝantojn.

La urbo konservas pitoreskan rurvilaĝan centron, kaj estas ĉirkaŭata de naturaj vidindaĵoj kaj montaraj kaj strandaj.

Fakte Herrera estas inter du gravaj diglagoj nome *Cijara* kaj *García de Sola*, kie eblas naĝado, sunbano kaj akvosportoj.

Proksime estas grava kolonio de gipoj kaj teritorio de aliaj gravaj birdoj kiaj nigra cikonio, agloj ktp., krom mamuloj kiel cervoj, aproj kaj aliaj.

Pri la programo ni povas anticipi ke parto de la kulturaj programeroj fokusiĝos sur la celebrado de la 24-a datreveno de la firmiĝo de la Ibera Skolo de literaturo en Esperanto, atelieroj pri kanto kaj poezio, prelegoj pri diversaj kaj interesaj temoj, kaj la jam menciita nova spektaklo *Vivu la teatro!*

Ankaŭ ni volas omaĝi la laboron de Jorge Camacho (Zafra, 1966) rilate al la esperanta literaturo kaj lia laboro en Beletra Almanako.

Kaj je nia deziro internaciigi la kongreson, ni planas la ĉeeston de (rusaj) siberianoj, kiu utilis kiel ĝemeligo de tiom apartaj popoloj. Kaj ni ne nur atendas viziton el Rusio. Ni ankaŭ invitos esperantistojn el diversaj landoj de Eŭropo, Azio, Ameriko, Afriko kaj Oceanio. Jes, Ekstremaduro ja estas loko de kontaktoj.

La Kongreso okazos somere kaj pro tio en la programo ne mankos vesperaj kaj noktaj distraĵoj kiel la nokta vizitado al la kastelo kaj rigardado de la julia stelaro. Krome, ĉiunokte estos muzikaj prezentadoj. Artistoj lokaj, regionaj, naciaj kaj internaciaj amuzigos al la tuta partoprenantaro de la kongreso.

Pri la turismaj ekskursoj, vi povos viziti la faman monaĥejon kaj tipan vilaĝon de Guadalupe. Kaj en la postkongresaj datoj ekos la famkonata Festivalo de Klasika Teatro en Merido.

Karaj legantoj de *Boletín*, ni havas unu jaron por prepari la venontan Hispanan Kongreson de Esperanto. Nia unika celo estas ke ĝi plaĉu al vi. Ni plenas je entuziasmo kaj ni laboras por ke vi kaj ĉiuj esperantistoj kiuj venos al la Kongreso pasu mirindajn kaj neforgeseblajn momentojn.

Karaj samideanoj, de tempo al tempo, mirakloj okazas. Ni havas multajn agrablajn surprizojn por vi.

Herrera del Duque, meze de la komarko Siberia, atendas vin. Rezervu tiujn datojn por la venonta jaro. Vi ĝuos ĝin!!

En la nomo de la LKK, elkore salutas vin.

Javier Romero.


JUNULARA AGADO

En la parta renovigo de la estraro de HEF, pri kiu vi povas legi en aparta artikolo, Alex Escobedo, nova prezidento de HEJS, anstataŭis la antaŭan prezidanton Jesús García.

RETA CENSO DE ESPERANTISTOJ

Ni kutimas diri al ĵurnalistoj ke ne ekzistas censo de esperantistoj. Tamen, de nun tio ne tute veras. Ĝi estas konstruata rete, danke al la iniciato de Hispana Esperantista Junulara Societo (HEJS).


Vizitu la paĝon <http://bit.ly/mapaESeo>, por vidi la ĝisnunan antaŭeniron, kaj aldoni vian nomon kaj datumojn ĉe la adreso.



Vi mem povas elekti gradojn de privateco, kaj alporti nur proksimuman adreson. Por ĉiuj detaloj, vizitu la paĝon kaj plenigu la simplegan formularon <http://bit.ly/mapaESeo-entra>.

KUNKREU VIDEOJN PROFESIECE

Per la iniciato de Alejandro Escobedo, nuna prezidanto de la hispana junulara sekcio, UEA/TEJO kaj ties anoj nun disponas je nova servo: kunkrei videojn profesiece, per retejo Powtoon, ĉe www.powtoon.com.



Eksplikojn eblas vidi en Esperanto per video farita per tiu sama sistema ĉe jena adreso: <http://youtu.be/-nQYo3GJABc>. Oni nun invitas aliĝi al reta forumo <https://groups.google.com/forum/#!forum/powtoon-uea-tejo>, kie interesitoj povas prezenti sin, siajn helpoeblojn, kapablojn kaj

iniciatojn, kaj por interŝanĝi ideojn por krei filmojn por la asocioj kaj individuoj.


INFORMOJ PRI LA PROJEKTO “DUA KIĤOTO”

Ni daŭrigas nian projekton por kunmemori la 400-an datrevenon de la publikigo de la dua parto de la verko Donkiĥoto de Manĉo. Pri la planoj vi povas legi en la pasinta numero de Boletín, kaj ankaŭ en la prelego, kiun pri tiu temo faris la prezidanto de HEF dum la Hispana Kongreso de Cullera, kaj kiun oni povas spekti en la reto en la jutuba kanalo de HEF: <http://www.youtube.com/esesperanto>.

ESPERANTO EN DONKIĤOTO PLURLINGVA

Esperanto estas unu el la lingvoj en kiu aperis la projekto "Donkiĥoto plurlingva", organizita de la Urbeŝtaro de El Toboso (la urbo de Dulcinea, la amatino de Donkiĥoto). Ĉiu ĉapitro aperas manskribita en po unu lingvo. En la esperanta versio kunlaboris diversaj homoj, inklude de Antonio Marco Botella, prezidanto de Fondumo Esperanto, unu infanino dekjara, aŭ Emilio Gastón, la unua Aragona Defendanto de la Popolo post la reveno de la demokratio, nepo de konata esperantisto kunfondinto de la zaragoza grupo "Frateco".

En la oficiala prezentado en la Instituto Cervantes de Madrido partoprenis Alejandro Escobedo, prezidanto de la junulara sekcio de Hispana Esperanto-Federacio.



DON KIĤOTO EN ISTANBULO KAJ EN TULUZO

Fine de marto la sekretario de Hispana Esperanto-Federacio donacis ekzempleron de la traduko al Esperanto de la verko "Don Quijote" kaj de la libreto "Donkiĥoto parolas Esperanto" al la grupo de esperanto de Istanbul, kunmemore al la 400-a datreveno de la publikigo de la dua parto de tiu universala verko.



En la samaj datoj ankaŭ la prezidanto de HEF donacis ekzempleron de la libreto eldonita de HEF al la grupo de Esperanto de Tulu-zo.

DONKIĤOTO EN LA MADRIDA KULTUR-CENTRO "CÍRCULO DE BELLAS ARTES"

La komuna laŭvica legado de la verko "Don Quijote de la Mancha" (Donkiĥoto de Manĉo) kiu ĉiujare disvolviĝas en la kultur-centro Círculo de Bellas Artes de Madrido en aprilo, denove en 2015 povis

kalkuli je la partopreno de la madridaj esperantistoj. Ĉijare fragmentojn en Esperanto legis David (Frego) kaj nia studento koredevena Heroo (Youngung Kim). Oni povas spekti mallongan filmeton kun pecoj de tiu legado ĉe la videa kanalo de la madrida esperantista grupo.

PLUAJ KONTAKTOJ KUN RILATO AL UNESKO

En aprilo la prezidanto kaj la sekretario de HEF, José Antonio del Barrio kaj Félix Jiménez Lobo, vizitis la sidejon de la Hispana Komisiono por Kunlaboro kun Unesko, kaj interparolis kun ties ĝenerala sekretario, Federico Palomera, konekse kun la festado de la 60-a datreveno de la rezolucio de Unesko favore al Esperanto. Ambaŭ prezentis la asocion, la Esperanto-movadon kaj la kampanjon de UEA por kunmemori la datrevenon.

Oni ankaŭ esploris pri la agadoj de la Komisiono, pri la reto de asocioj kun rilato al Unesko, kaj pri la eblecoj kunlabori. HEF proponis kunlaboron kaze ke iu ajn iniciato de la Unesko kun rilato al Hispanio meritis ian disvastigon aŭ kunlaboron, ekzemple per diskonigo aŭ tradukado.



Ni plu informos pri la eblaj rezultoj kaj postaj kontaktoj.

Aliflanke, la prelego de la prezidanto de HEF en la sidejo de la Klubo de Amikoj de Unesko de Madrido, pri kiu ni informis en pasinta Bulteno estas nun spektebla en la kanalo de Jutubo de HEF, ĉe la adreso: <https://www.youtube.com/watch?v=vjeBWWDHxDQ>.

SEP MILIARDOJ DA REVOJ

-UNU PLANEDO– KONSUMU ZORGEME!

(UN-moto/temo okaze de la "Monda Tago de la Vivmedio" je la 5-a de Junio 2015)

La Asocio de Verduloj Esperantistoj (AVE) volas atentigi ĉiujn kuncivitanojn kaj aparte la gesamideojn de la organizita kaj organizanta Esperanto-Movado pri la ĉijara temo de la "Monda Tago de la Vivmedio".

Ĉi moto celas ekologie daŭripovajn vivostilojn, al kiuj ni estas vokataj kiel individuoj kaj kolektivoj ĉie en la mondo. Jen la elangligita versio de la mesaĝo de la UN-ĝeneralsekretario Ban Ki-moon:

"La homaro konsumas plue seninterrompe pli multe da naturaj rimedoj ol la Planedo povas doni laŭ ekologiaj kriterioj. Multaj ekosistemoj de la Tero ek-kritiĝas. Fariĝas tempo por ni ŝanĝiĝi. Estas la celo de daŭripova evoluo plibonigi la vivokvaliton de ĉiuj homoj sen malutilo al la vivmedio kaj sen endanĝerigo de la bezonkontentigo de la venontaj generacioj. Ni povas atingi tion per ŝanĝo de niaj konsumkutimoj direkte al varoj, kiuj forkonsumas malpli da energio, akvo kaj aliaj rimedoj kaj per malpli da disipado de nutraĵoj. Ni festu la Mondan Tagon de la Vivmedio en ĉi jaro de transformado, en kiu ni esperas grandajn progresojn kampe de daŭripova evoluo kaj de la klimatoŝanĝiĝo, fariĝante pli konsciaj pri tio, kiom granda estas nia ekologia influo. Ni pensu pri la konsekvencoj por la vivmedio je ĉiu decido, kiun ni faras. Ni fariĝu pli bonaj prizorgantoj de nia Planedo!"

En Germanio la Monda Tago de Vivmedio havas la moton "Kune estas klimatoprotektado". En 2015, en Parizo, oni grave decidis pri la malakriĝo de la klimatoŝanĝiĝo kaj novformulado de la UN-celoj pri daŭripovo post 2015. Sed la klimatoprotektado (t.e. la limigo de la varmiĝo de la Tero je malpli ol 2 °C ĝis la fino de la jarcento) ne nur komenciĝas per internaciaj konvencioj. La unuopulo, ni ĉiuj, estas alvokataj! Kion ni povas fari? Jenaj 7 punktoj gravas: Loĝi pli energikonscie/ Ekkoni disipojn kaj eviti ilin/ Ripari, reuzu, recikli/ Vojaĝi malforen/ (Sin) movadi pli daŭripove/ Kultivi sentokse/ Manĝi klimatoadekvate. Kune kun tio estas klimato- kaj vivmedioprotektado. Ĉiu povas kontribui al tio, por si mem kaj por la mondo.

La Esperanto-Movado en siaj organizaj formoj ne estas netuŝataj de ĉi perspektivoj. La slogano "Kulturo ne permesas detruon de la naturo" validas, nuntempe pli multe ol antaŭe.

La devigo al zorgema konsumo por konservi la biosferon ne nuliĝas pro la altaj celoj de paco kaj homaj rajtoj. Ankaŭ en tempoj de paco kaj kun plena aplikado de homaj rajtoj la homaro bone kapablas ruiniĝi sian Planedon. Eble (kaj verŝajne) iun tagon la rajto havi netuŝitan biosferon fariĝos jurisdikciebla homa rajto. Sed ĝis tiam ni submetiĝu al la science pruveblaj gvidkonceptoj, kiuj fakte estas sen alternativo.

La Asocio de Verduloj Esperantistoj sub ĉi vidpunktoj denove proponas amendon-ŝanĝon de la UEA statuto (kaj de la statutoj de similaj esperantaj organizaĵoj), kiu deklaras la gvidprincipojn de la UN, nome pacon, homajn rajtojn kaj daŭripovon fundamento de la propra laboro.

Memorigindas la vortoj de Adorno: "Ne estas ĝusta vivo en la malĝusta!"

Wolfgang Guenther

ELEKTOAFIŜOJ EN ESPERANTO

Unu el la ĉefaj kandidatoj por la pasintaj municipaj elektoj en Hispanio, okazintaj la 24-an de majo, utiligis Esperanton por sia kampanjo. Temas pri la koalicio “Barcelona en común” (Barcelono Kolektive), kiun gvidis la konata aktivulo Ada Colau, kaj kiu fine rezultis la plej voĉdonata listo en la ĉefurbo de Katalunio. Ŝi nun fariĝis la urbestro de Barcelono, post la formiĝo de la novaj urbestroj.



Esperanto estis utiligata en afiŝoj, kiujn oni ankoraŭ povas trovi en la retejo de la kampanjo, en la adreso <http://barcelonaencomu.cat/es/material-de-campana>, kune kun dudeko da aliaj lingvoj, la plej disvastigataj en tiu ĉi multkultura urbo.

Pri la iniciato fakte respondecis la t.n. Akso pri Migrado, tio estas, la rondo kiu ene de la strukturo de tiu socia movado okupiĝas pri la problemoj de alilandaj kaj alilingvaj komunumoj en la urbo. Tiu Akso proponis la enkondukon de afiŝoj kaj aliaj kampanjaj materialoj en la lingvoj de la komunumoj de enmigrintoj en Barcelono, de la plej parolataj, kiel la angla, la araba, la urdua aŭ la ĉina, ĝis pli minoritataj kiel la rumana, la gvarania aŭ la amaziĥta (berbera), kaj eĉ respektante diversajn dialektojn kaj lingvajn variantojn. Per tio ili volis ne nur montri fokuson sur la multlingvismon mem, sed ankaŭ solidarecon kun tiuj komunumoj, kiuj, eĉ se ĝenerale ne voĉdonantaj en tiaj ĉi balotadoj jam iĝis parto de la barcelona socio.

En tiu kunteksto, esperantistoj ligitaj al tiu movado proponis la eldonon de la afiŝoj ankaŭ en Esperanto, por videbli la strebadon al akceptemo kaj multlingvismo. La respondeculoj de la “Akso” tion rapide aprobis, kaj nia lingvo eĉ aperas sur la unua loko en la retejo de la kampanjo. Pri la esperantigo respondecis ĉefe esperantisto veterana, aktivulo de la kampanjo de BeC. La iniciato ricevis kompletan apogon de la kampanjantoj, kiuj krome vidas la ĉeeston de Esperanto kiel kontribuon al la flegado de la kolektiva memoro de la popola Barcelono, urbo kie Esperanto dum multaj jaroj estis simbolo de popola aktivado.

La traduko estas senripoĉa, sed en la unua versio troviĝis iaj malglataĵoj (ekzemple, la uzo de “voĉi”, kiu estas historie ĝusta sed ne multe uzata nuntempe, anstataŭ “voĉdoni”), kiuj estis korektitaj en posta versio.

Pri la sekvo de la ĉeesto de Esperanto, oni ankoraŭ nenion povas aserti. Post la venko de la kandidato de BeC, estas penseble ke tiu strebo pri ampleksa multlingvismo povu roli kiel principo en la municipa agado, kaj ke Esperanto povu trovi lokon. Ni esperu.

Toño del Barrio

400a DATREVENO DE LA DUA PARTO DE DON QUIJOTE DE LA MANCHA

*“Don Quijote descende de Villagarcia de Campos”, diras la broŝuro de mia vilaĝo.
Don Quijote = Alonso Quijano aŭ Alonso Quijada?*

Kiam mi estis etulo (mi naskiĝis en la jaro 1950) mia patrino, instruistino, legis al mi diktaĵojn de la fama romano. Ŝokis al mi legi la nomon Quijada en la unuaj paragrafoj de la romano, kiu koincidas kun la nomo de la mezepokaj sinjoroj de mia vilaĝo.

Tiu familio, Quijada, estas familio de kavaliroj tre antikva kiu perdiĝas en la tempo. La unuaj aperas jam en la epoko de Alfonso la 6a de Kastilio, do en la jaro 1090, kaj en multaj skribaĵoj de la reĝoj ili aperas kiel akompanantoj en la militoj kaj en altaj postenoj de la tiamatempaj administracioj.



Jam en Madrido en la jaro 1970a mi aĉetis ekzemplerojn por legi la tuton kaj mi ĝin tralegis unu varman someron de Madrido dum la siestohoroj. Denove mi memoris la koincidon de la nomoj de la du personoj, unu historia kaj la alia kreita, kaj tio pensigis min.

Kial diable, neniu parolas pri tio en la vilaĝo? Mi demandis al mi. Eĉ ĉe jezuitoj, kiu havas tie eksterordinaran lernejon kun bela preĝejo, kie mi estis akolito, ankaŭ ne parolas pri la temo.

Post kelkaj jaroj, aĉetinte la verkon en Esperanto, mi denove reprenis la ideon kaj komencis esplori per mi men, kaj jen kion mi malkovris.

“Quieren decir que tenía el sobrenombre de «Quijada» o «Quesada»” (1a ĉapitro, la parto)

*“Oni diras, ke li portis la nomon de Quijada aŭ Quesada.” (Trad. De Diego)
En la sama ĉapitro (la 1a de la 1a parto)*

oni legas la jenon:

“Puesto nombre, y tan a su gusto, a su caballo, quiso ponerse a sí mismo, y en este pensamiento duró otros ocho días, y al cabo se vino a llamar «don Quijote»; de donde, como queda dicho, tomaron ocasión los autores desta tan verdadera historia que sin duda se debía de llamar «Quijada», y no «Quesada», como otros quisieron decir.”

“Dominte nomon al la ĉevalo tiel konforman al lia gusto, li decidis fari la samon rilate sin mem kaj cerbumadis ok pliajn tagojn ĝis li alprenis al si la nomon Don Quijote; kiel supre dirite, sur tio sendube baziĝis la aŭtoroj de ĉi vera historio por konjekti, ke li certe nomiĝis Quijada, ne Quesada., kiel aliaj asertis “ (Trad. De Diego)

Mi legis kaj relegis kaj mi malkovris, ke en la ĉapitro 49a de la 1a parto Don Quijote diras al la akompanantoj reen al lia hejmo “

“Y las aventuras y desafíos que también acabaron en Borgoña los valiente españoles Pedro Barba y Gutierre Quijada (de cuya alcurnia yo desciendo por linea recta de varón), venciendo a los hijos del conde San Polo “ (49a ĉapitro, 1a parto)

“Oni negos ankaŭ la aventurojn kaj defiojn plenumitajn, en la sama Burgonjo, de la kuraĝaj hispanoj Pedro Barba kaj Gutierre Quijada (de kies familio mi devenas laŭ rekta linio vira) kiuj venkis la filojn de la grafo Sankta Polo.” (Trad. De Diego). Temas pri Gutierre Quijada la 4a.

Leginte la 49an ĉapitron, la duboj foriris el mia kapo, sed spite de tio mi decidis plu legi kaj mi prunteprenis, de la biblioteko proksime al mia domo de Valladolid, *Don Quijote* de Avellaneda, ve! kia surprizo, en kelkaj paragrafoj oni nomas Don Quijote, *S-ro Quijada*.



Ĉu Avellaneda kaj amikoj kiuj verkis sian Don Quijote, ankaŭ eraris en la nomo? tute certe tiuj personoj vivis samtempe ol Cervantes kaj konis unu la aliajn, ankaŭ ili ĉiuj sciis kiu estis Gutierre Quijada (1) kaj la historion de ties familio; la lasta reprezentanto de tiu familio, Luis Quijada (2), estis ĉefservisto de la imperiestro Karolo la 5a kaj Don Luis proponis al la imperiestro havi en sia kastelo (en Villagarcia de Campos) lian filon, Don Juan de Austria (Jeromín), do, estis familio tre proksima al la reĝa familio, kaj eble pro tio Cervantes elektis ĝin.

Don Quijote de Avellaneda

“Pero, ¿sabe señor Quijada, que me acuerdo que el domingo pasado llevó el hijo de Pedro Alonso, el que anda en la escuela un libro debajo de un árbol, junto al molino, y nos estuvo leyendo más de dos horas en el”? (1a ĉapitro)

“Sed, ĉu vi scias Sr, Quijada, mi memoras que la pasintan dimanĉon la filo de Pedro Alonso, kiu iras al la lernejo, kunportis libron ĉe la arbon, apud la muelejo, kaj

legis ĝin al ni dum pli ol du horoj?” (Trad. Pedro Garrote).

“Admirome no poco, señor Quijada, que un hombre como vuesa merced “. (2a capítulo)

“Mi miregas, Sr. Quijada, ke viro kiel vi “. (Trad.: Pedro garrote)

<http://hhh.gavilan.edu/fmayrhofer/spanish/astrana/tomoIV/images/89.htm>

Unu filo de Gutierre Quijada la 2a de Villagarcia enmigris en Becilla de Valderaduey kaj de tie alia Gutierre Quijada enmigris en Toledo kaj Esquivias, kaj unu membro de tiu familia branĉo edziĝis kun membro de la familio Palacios de Salazar. Familio Quijada estis juddevena, pro tio devis peti, en la Reĝa Kancelierejo de Valladolid dokumenton kiu pruvas ke ili jam ne plu estas judaj, sed puraj kristanoj.

Kompreneble Cervantes konis la historion de la familio Quijada, ĉar Gutierre Quijada la 4a estis tre fama pro siaj aventuroj, kaj, krome, Jeromín (Don Juan de Austria), vivis sep jarojn en Villagarcia kun la lasta Quijada, des pli ke li (Cervantes) edziĝis al Catalina de Palacios de Salazar.

En la jaro 1998 oni eldonis libron pri la familio Quijada kaj Ulloa, en kiu oni parolas pri ĉiuj membro de la familio Quijada, inter ili Gutierre Quijada la 4a, kaj tie mi legis la aventuro kiu aperas en la fama romano.

Ne antaŭ longe falis en miajn manojn triptikon en kiu mi legis la frazon de la titolo de ĉi tiu eseo. La triptiko estas eldonaĵo fare kaj de la Urbodomo de Villagarcia kaj de la Deputitejo de Valladolid. Mi supozas ke ambaŭ institucioj studis, pli vaste ol mi, tiun aferon, sub la konsiloj de profesoroj de la Universitato, tiel ke la broŝuro ne estu ridinda al la legantoj.

Mia dubo estas, ĉu la fama vaganta kavaliro nomiĝas Alonso Quijano aŭ Alonso Quijada?

Ĉiu diras ke Alonso Quijano, ĉar Don Quijote en la lasta ĉapitro de la dua parto, kiam li estas en la lito tuj mortonta, diras,

“Yo fui loco y ya soy cuerdo; fui don Quijote de la Mancha y soy agora, como he dicho, Alonso Quijano el Bueno.”

Mi perdis la racion kaj ĝin mi retrovis. Mi estis Don Quijote de La Mancha kaj estas nun, kiel dirite, Alonso Quijano la bona. (Trad.: De Diego)

Nur pro tio, multaj pensas ke infanoj, frenezuloj kaj maljunuloj kun unu piedo en la tombejo ĉiam diras la veron, sed ĉu ankaŭ Don Quijote? Mi dubas, VALE.

Pedro A. Garrote

(1) Gutierre Quijada la 4a. Gutierre Quijada – Tiu kavaliro vivis dum la tempo de Juan II de kastilio kaj Enriko la 4a.

(2) La tri fratoj Pedro, Juan kaj Luis, mortis en milito, ne havis filojn kaj la ĉefa dinastio malaperis, sed koninte tion en Esquivias, ili konservis la familian nomon.

Luis, guvernisto (ayo) de Don Juan de Austria, mortis en Las Alpujarras en la jaro 1570a. Pro tio li ne partoprenis en la batalo de Lepanto.

PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

ANDALUZIO

**“ESPERANTO KAJ UNIVERSITATO”, temo de la 19-Andaluzia Kongreso de Esperanto.
Jerez 30-a oktobro / 1-a novembro 2015**

Ofte, la adopto de pritraktota temo en niaj kongresoj estas nur cel-deklaro, kiu poste estas plimalpli traktata. Okaze de la venonta andaluzia kongreso de Esperanto, Andaluzia Esperanto-Unuiĝo aprobis, ke la oficiala temo estos “Esperanto kaj Universitato”, kaj ĉi-foje nia emo estas abunde pritrakti la temon.



19-a Andaluzia
Kongreso de Esperanto
"Universitato kaj Esperanto"

de la 30-a de oktobro ĝis la 1-a de novembro 2015
Jerez de la Frontera

ayuntamiento de Jerez SOLO P.X.M.L.E. E.S. AEU JEREZ MOTOCICLISMO

Unue, pro la fakto, ke dum la lastaj monatoj komitato de AEU laboras senlace por prezenti peton al la andaluziaj universitatoj, cele la acekpton de la E-diplomo de la Universitato Eötvös Loránd de Budapeŝto (Hungario) kiel sufiĉa dokumento por konfirmi la konon pri lingvo. Estas necese memori, ke post la ŝanĝoj aprobitaj en la universitataj stud-planoj en Hispanio, estas necese akrediti, ke oni posedas B1-diplomon pri kono de lingvo.

Oni pensas, ke tiu lingvo nepre devas esti la angla, sed male, la universitatoj de Andaluzio, kaj ankaŭ tiuj de la ceteraj landoj de Hispanio, akceptas diplomojn pri aliaj lingvoj (portugala, japana, finna, ĉina...) Do, kial ne pri Esperanto? Jen nia tasko, peti la oficialan akcepton de tiu diplomo en la universitatoj de Andaluzio, temas pri la projekto *Gaudeamus*, pri kiu ni informos dum la venonta Andaluzia Kongreso.

Ni ankaŭ deziras debati pri la instruado de Esperanto en la hispanaj universitatoj. Sciate, ke en kelkaj superaj centroj (ekz. La Laguna kaj Basklando) tiu instruado okazas/okazis kaj ĝi ĝuis akademian valoron. Do, ni invitos profesorojn de tiuj kursoj, kiuj sciigos al la kongresanoj pri kiamaniere ili atingis la aprobon rilate la organizadon de tiuj kursoj kaj kiel ili disvolviĝis.



Trie, kaj laste, ni prezentos la nuntempan esperantan kaj interlingvistikan universitatan kurson okazantan en Poznano (Pollando). Por plenumi tion ni invitos studentinon de tiu kurso rakonti al ni ŝian sperton en tiu universitato kaj ankaŭ ĉu estus eble okazigi similan kurson en Andaluzio.

Kompreneble en Jerez ni okazigos aliajn programerojn, pri kiuj vi povos legi abunde sur diversaj gazetoj kaj ĉiuj ili estas sufiĉe allogaj el la kultura kaj turisma vidpunktoj.

Tamen, la kerno de la Kongreso estos la Universitato, do se al vi interesas la disvastigo kaj la sukceso/malsukceso de nia lingvo tiuloke via ĉeesto kaj partopreno en la venonta Andaluza Kongreso estas nepra.

Ĉi-jare la temo de la Kongreso estos unu el la ĉefaj kialoj por veni en Andaluzion, kvankam por tio ĉiam estas sufiĉaj motivoj.

EN LA RENKONTO DE ALTERNATIVOJ DE SEVILO

La esperantistoj el Sevilto partoprenis meze de aprilo la 23-an Renkontiĝon de Alternativoj. Inter la 10-a kaj la 12-a ili disponis informan budon en la Parko de San Jerónimo. Dimanĉe la 12-an, Juan de Dios Montoto prelegis pri "100 jaroj de Esperanto en Sevilto".

ARAGONO

EKSPOZICIO PRI ESPERANTO EN EJEJA DE LOS CABALLEROS

La 27-an de majo estis inaŭgurita en la Kulturcentro Centro Cívico de la aragona urbo Ejea de los Caballeros ekspozicio pri Esperanto, utiligante la panelojn pretigitajn de HEF kaj alian materialon provizitan de la grupo "Fratego" de Zaragozo. La ekspozicio daŭris ĝis la 12-a de junio.

La ĵaŭdon 28-an de majo je 19 horo Eduardo Berdor, membro de la Estraro de HEF, prezentis prelegon kun enkonduko al Esperanto.

MADRIDO

KULTURA VIZITO AL LA BANKO DE HISPANIO

La 6an de majo Madrida Esperanto-Liceo organizis kulturen viziton por koni la centran sidejon de Banco de España. Tre zorge kontrolata estas la akcepto de vizitantoj, kio kaŭzas iom da tediĝo. Sed tuj zorgis pri ni sperta kaj profesieca gvidisto, kiu dediĉis al ni tri plenajn horojn. Li klarigis la funkciojn, intajn kaj nunajn de la institucio, priskribis la konstruaĵon (la plej valoran en Hispanio), montradis kaj klarigadis salonojn, koridorojn, imponajn ŝtuparojn, pentraĵojn, meblojn, vitralojn. Li detale priskribis ankaŭ la profundan kelon por gardi la or-provizon, sed tion la vizitantoj ne povis vidi. Fine ĉiu ricevis mansakon kun kelkaj donacoj aludaj al la institucio.

Badajoz (Don Benito)



Nia samideano José Salguero (Kani) gvidas Esperanto-kurson en mezlernejo Cuatro Caminos de la urbo Don Benito. Ni deziras al li sukceson kaj fruktodonan kurson, ĉar la lernantoj estas vere junaj.

Tenerifo (La Laguna)

La merkredon 15-an de aprilo, vizitis la Esperantan Societon de Tenerife (ESTO) la francaj geed-



zoj, aktivaj esperantistoj, Arlette kaj Edmond Plutniak. Estas la tria fojo ke ili vizitas kaj ĝuas la klimaton kaj belecon de la insulo Tenerife. Okaze de la menciita vizito ili prezentis filmon interesan rilate al la vojaĝo, kiun ili partoprenis kune al aliaj geesperantistoj per trajno tra Siberio kaj Japanio. La kunveno havis amikan etoson, kaj ili denove subskribis en la vizitlibro. Belan renkontiĝon kaj iom da melankolio en la emocioj. La foto montras momenton de la kunveno

dum la eksplikado detale pri la belaj imagoj kaptitaj.

LINGVA ANGULO

Karno kaj viando

Interrete mi trovis la hispanlingvan paĝon “Errores habituales en esperanto”, kaj mi tuj pensis, ke indus aperiĝi ilin iom post iom en *Boletín*, tamen prefere post kontrolo fare de unu aŭ kelkaj lingve pli spertaj reviziantoj.

Temas pri listo de kutimaj eraroj kun 101 eroj. Por montri, ke la listo bezonas revizion, ni vidu ekzemple la eron n-ro 48 (“carne”; mi aldonas tradukon inter rektaj krampoj):

Viando es la carne de animal. [viando estas la karno de besto]

Karno es la carne de la fruta o verdura. [karno estas la karno de frukto aŭ legomo]

Nu, la realo estas tute alia, kaj iom pli komplika, ol tiu misgvida “klarigo”.

Konsulto de la vortaroj de AdE (Akademio de Esperanto), nome *Universala Vortaro* kaj *Akademia Vortaro*, montras al ni ke la vorto “viando” estas pli frua, jam en la Fundamento, kaj ke “karno” venis poste, en la Unua Oficiala Aldono. Tiajn informojn kaj plenajn difinojn kun ekzemplaj frazoj ni trovas i.a. en *Reta Vortaro (ReVo)* kaj en la reta versio de *Nova Plena ilustrita Vortaro de Esperanto (NPiV)*, el kiu mi citu jenon:

karn'o

1 Organisma mola fibreca substanco, troviĝanta sub la haŭto de la animaloj, kontraste kun la haŭto k la ostoj: *mi hakos al vi la akrajn spronojn en la karnon^Z; la hundoj formangos la karnon de Izebel^X; karnon, kune kun ĝia animo, la sango, ne manĝu^X; mi ne plu deziras, ke vi (pupoj) ricevu karnon k sangon^X; ĉeesti kun karno k ostoj (proprapersono); tranĉi rekte en la karnon^Z (pf: akre k trafte kritiki).* ☞ viando, fiŝo.

2 Tiu substanco, rigardata kiel karakterizo de la homo, kontraste kun la spirito: *ne karno k sango, sed la koro faras nin patroj k filoj^Z; ili, edzo k edzino, estos unu karno^X; en mia karno, en mia naturo loĝas nenio bona^Z; iri la vojon de ĉiu karno^Z (morti); vi estas lia karno, lia sango^Z (fil[in]o).*

3 Mola fibreca substanco, lokiĝinta sub la ŝelo de fruktoj, rigardata kontraste kun la kerno(j): *la karno de persiko, de melono.*

Kaj ni komparu kun:

**viand/o*

1 Karno, uzata por nutrado: *tiuj, kiuj manĝas viandon de porko, estos ekstermitaj^X; blanka viando* (el kokino, kokido, bovido); *ruĝa viando*; *abstini je viando* (religio); (f) *ĝi estas nek viando, nek fiŝo^Z* (dubsenca).

2 (ark.) Karno: *iliaj piedoj el viando k ostoj perdas la forton^Z.*

1 enricbaltasar.com/errores-habituales-esperanto/

2 akademio-de-esperanto.org/fundamento/universala_vortaro.html

3 akademio-de-esperanto.org/akademia_vortaro/

4 reta-vortaro.de/revo/

5 vortaro.net/

6 tekstaro.com/

7 Rete legebla ĉe robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/eo/

Multe pli da ekzemploj i.a. zamenhofaj troveblas en *Tekstaro de Esperanto* kaj en *Proverbaro Esperanta*, konkrete:

2451: Tranĉi rekte en la karnon

688: Ĝi estas nek viando, nek fiŝo

1356: Li havis viandon, mi havis nur oston – li havis la ĝuon, mi pagis la koston

Resume, antaŭ ol provi instrui progresige Esperanton al komencantoj, des pli en vaste publikaj forumoj kiel tiuj interretaj, oni unue atente konsultu niajn plej gravajn vortarojn kaj, se necese, ankaŭ la verkojn de niaj plej bonaj aŭtoroj.

Jorge Camacho

LASTAMINUTA NOVAĴOJ

NOVA LIBRO DE MADRIDA PROFESORO PRI ESPERANTO



Oni ĵus eldonis libron pri Esperanto, en la angla lingvo, ĉe la eldonejo de la universitato de Pensilvanio. Ĝia titolo estas "Esperanto and Its Rivals, the Struggle for an International Language" (Esperanto kaj ĝiaj rivaloj, la lukto por internacia lingvo). La aŭtoro estas Roberto Garvía, profesoro de Sociologio de la universitato Carlos III de Madrido.

En la libro, Garvía analizas la movadojn por internaciaj lingvoj, fokusigante sian atenton en la malsamaj strategioj sekvitaj de la partianoj de Volapuko, Esperanto kaj Ido. Li esploras la kialojn pro kiuj Esperanto venkis en la batalo kontraŭ la ceteraj konstruitaj lingvoj, sed tamen malvenkis en la milito kontraŭ la angla kiel internacia mondlingvo.

Garvía verkis ĝin ĉefe dum sia estado en Usono kiel profesoro de la katedro "Princo de Asturio", kiun la hispana registaro sponsoras en la universitato Georgetown.

FORPASIS ANTANAS MEKYS (1917-2015)

La 18-an de junio forpasis en Vilno la litova esperantisto Antanas Mekys, Honora Membro de UEA ekde 2003. Li naskiĝis la 17-an de novembro 1917 en la vilaĝo Vilūnaičiai de la distrikto Pakruojis. En 1940 li finis instruistan lernejon en Šiauliai kaj en 1946 la ekonomikan fakultaton de la Vilna Universitato, ĉe kiu li lektoris kvar jarojn kaj poste laboris ĉe la ŝtata komitato pri planado ĝis sia emeritiĝo. Pri Esperanto li ekinteresiĝis en 1933, sed serioze li ekstudis ĝin kaj ekaktivis movade en 1959. Ekde 1965 li estis aktiva kursgvidanto.

POEZIA ANGULO

Fantazio pri postmorta vivo.

PRI LA SENFINA KOSMO
Hieraŭ mi sonĝis ke mi sonĝis,
ke mi ne plu estis vive vivanta,
ke mi estis ĉi mondon forlasanta
iranta al Kosmo kie mi vere ĝojis.

Kaj mia ĝojo certe ja motivas
ĉar mi eniris en mond' pli saĝa
en tiu nomata Kosm' senlima
pri kiu la hom' nenion scias.

Kaj tie mi konstatis.....
Ke ĉiuj estaĵoj tie ja sin amas,
ke Bono kaj Belo estas vivrealo
en la ĉiutaga homa kunvivado;
kaj tio en la Ter' nomata idealo
estas en Kosmo ekzisto ordinara
kiu eĉ ne meritas laŭdojn vanajn...

Tie ne estas komenco kaj fino,
naskiĝo kaj morto ne ekzistas,
la spaco estas tute, tute senfina,
kaj konstanta Veron kaj Feliĉon...

Kiam mi vekigis kaj meditis,
tute ne trovis trafajn konkludojn:
-kiu en la Ter' malamon inventis
incitanta la lukton inter fratoj?
-Kial la hom' toleras malsaton
al tiom da malfeliĉaj infanoj?
-Kial vivofino oni nomas morton
kaj ne nova vivo en Kosmo?



Ne estas facile deĉifri tiujn enigmojn
sed ni povas fari konkludojn raciajn:
se evidentas ke malam' estas hom-eraro
ni forĵetu de la Ter' tiun malsaĝon!
Se feliĉon ni perceptas en Kosmo
ni strebu en la Ter' por tia idealo
difinita per Bono, Vero kaj Belo
kiuj plenplenigas niaj aspir-imagoj !!

Ekzistas en nia mond' gravaj teorioj
inventitaj de multnombraj religioj,
kiuj kvankam ekzaltas ĉiam Bonon
praktikas malamon kaj fikrimon,
do ni penu direkti nian inklinon
al tiu Kosmo senfina el mia sonĝo
kiu vivante sen komenco kaj fino
nur celas vivi en plena feliĉo!!

Antonio Marco Botella



Klaĉemuloj

Ordinaruloj klaĉadas
kaj kun sarkasmo mokadas
oldulinon transirantan.
Senskrupulaj kaj senhontaj,
refoje mokas
la malbelan sinjorinon,
kiu ŝminkis sin kun arto
por aktori...
en la teatro de l'vivo.
Ili senhalte mokadas
belecon kaj malbelecon,
kaj sen principoj moralaj
senskrupule ade klaĉas
kaj kun tre sarkasma emo
vundas ĉies sentivajn sentojn.
Kompatindaj klaĉemuloj,
kaj sarkasm-ordinaruloj,
kial vi perdas la tempon
per fiula amuziĝo?
Via tempopasigilo
por vi estas amuzado,
sed por la preterpasantoj
estas malnobla ĝenado.



ILUSTRACIONESGRATIS.COM

Kion vi planas?

Kion vi planas fari ĉi matene?
Ĉu vi daŭre trairos saman vojon?
Atentu viajn paŝojn laŭ la roĵo
ĉar ĝi fariĝis granda...
Pluvego abunde falis tutan nokton
kaj vi riskas gliĉi sur la koto.
Atentu kara mia ĉi matene,
mi estas atendantita...



La malplena nesto

Flugadas maltrankvila birdo
ĉirkaŭ la malplena nesto,
kun sufok' kaj granda timo
ĝi ade pepas
kaj pri l'malbona sorto
ĝi triste plendas
kaj ne kuraĝas sidiĝi
sur la branĉo kie kuŝas ĝia nesto,
ĉar ovoĵo mankas,
mankas espero...
ĉio malplenas
kaj eĉ la vento-puŝo
retenas... sian spiron
kun granda sento.
Kiu kapablis fari tiun difekton
al tiu kompatinda birdo?
Nur l' homa malprudento
kaprice rompas bestosentojn
kaj detruas stulte, eĉ kun kontento
la koron de bela birdo,
kiu nun denove ekflugas
al la ĉielo
kun la espero renkonti
novan esperon.

Ángel Arquillos

LA 31-A PSI WINTERBERG



La Pasko-semajno okazis la 31-a PSI de la 3-a ĝis la 10-a de aprilo 2015 en la mezmontara “Sauerland”-regiono en la pitoreska urbe-to Winterberg de Germanio, kiu enhavas ĉirkaŭ 13 000 enloĝantojn. En la malnova centro videblas kelkaj domoj en trabfaka stilo. Okulfrapis domoj komplete kovritaj per ardejaz tabuloj diversmaniere kombinitaj. La regiono estas ŝatata pro vintraj sportoj, kion ni povis sperti. Estis ankoraŭ sufiĉe da neĝo por profiti ĝin por diversaj ludoj kaj kreado de blanka lepuro.

La aranĝon partoprenis 130 geesperantistoj el deko da landoj inter kiuj multaj familioj kun infanoj de ĉiuj aĝoj. Ili tre ĝuis la renkontiĝon. La plej juna estis nur kelkmomata. Etuloj ĝuis ludadon, spektis Mazi-

filmon, aŭskultis piĝamajn rakontojn kaj kreis diversajn artaĵojn. La pli grandaj kolorigis T-ĉemizojn kaj ludis tablotenison. La libroservo ofertis ampleksan elekton de diversaj libroj kaj aliajn esperantaĵojn. Eblis profiti saŭnon kaj lui biciklojn. Trinkejo ofertis diversspecajn bierojn, vinojn, aliajn trinkaĵojn kaj dolĉaĵojn.

Okazis kelkaj E-kursoj, gimnastikoj, sportoj kaj interesaj prelegoj, inter kiuj menciindas kulturo de daŭripovo, unikodo, origamio, poŝtranĉilo. Evoluiga projekto en Etiopio, raportoj pri Himalajo kaj Hindio estis akompanataj per interesaj bildoj. La partoprenantoj interesiĝis pri enkonduko al la japana lingvo, historia vivmaniero en Litovio, okazaĵoj en nuna Ukrainio kaj ukrainaj kantoj. Estis donitaj klarigoj pri la memmasaĝo, “Yumeiho” kaj kolor-terapioj. Ni akiris informojn pri la Reta Vortaro.



Interesis kurso pri karateo kaj eblis ĉeesti ĉiutagan fizikan ekzercadon Ĉigongo kaj praktiki “Zumbon”. Junuloj havis sian programon, kiu konsistis el kaosludo, turniroj kaj ĉefe el filmo-prezentoj en du ĝis kvar dimensioj.

Ne mankis paskaj ovoserĉado kaj vespera fajro, kion ĝuis ĉefe la infanoj. Venis ankaŭ ĵurnalistoj por intervjui kelkajn partoprenantojn kaj poste aperis artikoloj en lokaj ĵurnaloj.

Vesperoj estis animitaj per diversaj ludoj. Ni ĝuis bingon, pupspektaklon, familian duelon inspiritan laŭ televida lud-elsendo. Tre aprezata estis vespera koncerto de klasika ĵazo prezentita de Frank Selten kaj liaj amikoj. La internacia vespero konsistis el kontribuoj de la partoprenantoj. Ni spektis kantadon de la plej malgrandaj infanoj, anekdotojn, kantojn en ukraina kaj Esperantolingvoj, gitar-, violon- kaj harpo-ludadon. Ĉe la fino oni dankis al ĉiuj kunhelpintoj kaj kontribuintoj al la sukcesa programo. La venontjara PSI okazos en Bad Hersfeld de la 25-a de marto ĝis la 1-a de aprilo.

Kutimaj posttagmezaj ekskursoj gvidis nin al urbogvidado, al Parko de eŭropaj bizonoj, ercminejo Ramsbeck, al amuzparko "Fort Fun". Interesa estis ekskurso al la proksima urbeto Eversberg, kie ni vizitis interesan endoman muzeon. Krome ni vizitis urbetojn Oberkirch, Hallenberg kaj Medebach. Multaj profitis belan sunan veteron por arbaraj piedpromenadoj kaj kelkaj biciklantoj malkovris vastan ĉirkaŭaĵon.

Liba Gabalda

23-A INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO

La ĉijara Internacia Semajno organizata de niaj kompanoj de Katalunio okazos en la urbo Roses, de la strando de Santa Margarita de la "Costa Brava". La sidejo estos la Hotelo Prestige Sant Marc kaj la datoj: de la 3-a ĝis la 10 de oktobro 2015.

Aliĝkotiĝoj: ĝis la 31-a de julio, 25 €; post la 31-a de julio, 35 €; gejunuloj ĝis 30 jaroj: senpage. Por ĉiuj detaloj, informoj kaj aliĝoj, kontaktu kun Luis Serrano, ĉe luis_serrano@ya.com, aŭ luis_serrano@mixmail.com.

AKTIVAĴOJ EN KASTELO GRESILJONO

La Esperanto-kastelo Gresillon nin ĉiujn atendas en julio kaj aŭgusto. Vidu ĝian agendon/kalendaron en la retejo <http://gresillon.org.agendo>. Jen plej gravaj:

06/13 de julio: Ferioj - Familioj - Interŝanĝoj reciprokaj de scioj, por familioj kun infanoj, spirito RERS kaj SEL, variaj aktivaĵoj kaj Esperanto-kurso

20/25 de julio: Kasteloj de la Luaro - Turisma semajno - oficiala antaŭkongreso de la 100-a UK en Lilo

01/08 de aŭgusto: Lingvoj kaj kulturoj de l' mondo - postkongreso de la 100-a UK en Lilo

08/16 de aŭgusto: Festa Semajno por infanoj kaj familioj - postkongreso de la 44-a IIK

La Kulturdomo de Esperanto - Kastelo Greziljono situas en St. Martin d'Arcé, 49150 Baugé-en-Anjou, Francio, inter Angers, Tours kaj Le Mans.

SAT-kongreso en Nitro

Post Dinano_(Francio) en 2014, de 08a ĝis 15a de aŭgusto 2015 okazos e Nitro Slovakio, la 88a SAT-Kongreso.



Jam SAT pasinte kongresis en Bratislavo en 2004, por alia palindrom-numera kongreso, la 77a.

Vi povas rekte pleniĝi la retan aliĝ-formularon ĉe : <http://sat.iks.net/aligxilo.php>.

Tie vi trovos ankaŭ aldonajn informojn pri la programo, pri planitaj ekskursoj, pri praktika atingebleco ktp... Por kontakti kun OKK (Organiza Kongreso-Komitato) :

Retpoŝte : [sat2015\(ĉe\) ikso.net](mailto:sat2015(ĉe) ikso.net)

La 88-a SAT-kongreso okazos en la universitata studentejo "Bernolák". Nitra estas bela kaj historia urbo, situata nur 90 km de Bratislavo. Distanco de la Viena flughaveno (Schwechat) ĝis Bratislava estas ĉ. 45 km kaj la distanco de la Budapeŝta flughaveno al Nitra estas ĉ. 155 km.

En Nitra jam tri-foje okazis SES, kaj en la jaro 2016 la urbo gastigos la Universalan Kongreson – la SAT-kongresanoj do havos eblon “gustumi” la urbon jam jaron antaŭ UK!

La programo konsistos el kelkaj partoj:



Antaŭtagmeze kaj posttagmeze: ekskursoj, prelegoj, manlaboroj, sportoj, laborgrupoj, ktp.

Vespere: Nacia kaj Internacia Vesperoj, koncertoj, filmospektado, diskoteko...

Pli detalan programon oni aperiĝados iompostiome en la retejo kaj oni informos pri ĝi en sekcio “Freŝaj novaĵoj”.

La organizantoj

LA FONTO DE LA ESPERANTA GRUPO "LUMRADIO" EN ĈESTE II



En la jaro 1909, kiel planite, okazis la Kvina Universala Esperanto-Kongreso en Barcelono, de la 5a ĝis la 11a de septembro. La sukceso estis kompla: la solena Malfermo okazis en la Belarta Palaco de Barcelono. Unuafoje okazis en Universala Kongreso beletra Konkurso, poste nomataj Floraj Ludoj. Unu el la venkintoj de la plej gravaj premioj de la Konkurso okazinta en la Barcelona Kongreso estis la valenciano Vicente Inglada Ors, prezidanto de la Esperanto-Grupo de Valencio.

La sukceso de tiu Postkongreso superis la plej optimismajn kalkulojn: la 14an de septembro alvenis D-ro Zamenhof en Valencion kun la plej granda parto de partoprenantoj en la Postkongreso.

Kiam la alvena horo alproksimiĝis, oni rimarkis gravan movadon en Valencio, precipe en la ĉirkaŭoj de la Norda stacidomo, kiu prezentis la aspekton de la grandaj festotagoj. Multaj personoj sin direktis al la stacidomo por akcepti la invititojn, multaj veturiloj atendis ekstere, kaj popolamaso alkuris scivoleme por ĉeesti en la grandioza alveno...

Nur kelkaj minutoj antaŭ la alveno de la ekspresa trajno, la stacidomo montriĝis nesufiĉe loka por enteni tiom da publiko. Tie estis la urbestro kun la urbokonsilantanoj de Valencio, la Prezidanto de la granda Ekspozicio, Kronikisto de la urbo, Direktoro de la Musik-konservatorio kaj la plej elstaraj gvidantoj de kulturaj Valenciaj asocioj, kaj kun ili la esperantistoj de la urbo kaj la regiono, kaj inter ili samideano Francisco Máñez kaj kelkaj el la novaj geesperantistoj el Ĉeste...

Kiam la trajno eniris en la stacidomon eksplodis la emociigan momenton kaj entuziasman aplaŭdadon sonadis, dum la muzikbando ludis, "La Espero"-n, himno de la esperantistoj, kiun ĥore kantis ĉiuj alvenintoj kaj atendantoj, dum oni vivuis al D-ro Zamenhof kaj al Esperanto! La amaso estis tiel multnombra ke en la unuaj momentoj estis neeble sin movi kaj saluti al la karaj alvenantoj. D-ro Zamenhof kaj lia edzino eltrainiĝis kaj D-ro Aguilar Blanch, reprezentanto de la Valencio Urbestraro, prezentis ilin al ĉiuj eminentuloj kun granda malfacilo.

Kiam la komplimentoj estis faritaj, meze de tiu bruego, la invititoj kun D-ro Zamenhof eliris el la stacidomo kaj sin direktis al la veturiloj, minimume dek, per kiuj ili iris ĝis la hotelo *Palace Hotel* kie Zamenhof kaj lia edzino devis loĝi. La aspekto de la placo Paz estis plene kompleta kaj la aplaŭdoj ne ĉesis. Li, Zamenhof, devis sin montri al la publiko por danki ĝin ĉar la aklamoj daŭradis.

Tie, en la placo, estis ne la altrangaj sinjoroj, sed la vera popolo, kiu sciis ke tiu homo estis vera pacamanto kaj aŭtoro de la pacprojekto por kiu li strebis senlace. Ambaŭflanke de la balkono, kie aperis la Majstro, oni vidis du belegajn tapiŝojn de floroj, arte kaj bele faritaj, kiuj vertikale estis almetitaj kaj montris du grandajn paragrafojn el floroj, kiuj diris: "Vivu D-ro Zamenhof"!!, "Vivu Esperanto"!!.

Post tiu brila akcepto, la programo preparita por tiu Post-kongreso malvolviĝis tre sukcese. Samideanoj Máñez kaj la ceteraj akompanantoj el Ĉeste, revenis al ilia urbo kun la koro plena de entuziasmo kaj fervoro, kaj sen plu atendi ili decidis fondi la Esperantistan Grupon de Ĉeste, kun la nomo *Lumradio*, kiun prezidis dum multaj jaroj Francisco Máñez Sánchez.

DUA KONKURSO PRI RAKONTOJ DE “LOS PINOS DE RETIRO”

(Lasta prezento)

En la du lastaj numeroj de Boletín, aperis mia esperantigo de la verkoj, kiuj ricevis la tri unuajn premiojn en la Dua Konkurso pri Rakontoj organizita de la madrida najbar-asocio Los Pinos de Retiro. Ĉi-okaze min honoras prezenti al vi miajn tradukojn de du rakontoj, kiuj, kvankam ne premiitaj, posedas literaturajn valorojn, kiuj faras ilin publikigindaj kaj ĝuindaj. La aŭtorino de la unua originalo estas Soledad Cordero; la aŭtorino de la dua, Cristina Díez. Juĝu mem.

Miguel Fernández.

Soledad Cordero

LA FREMDULO

Tiu homo troviĝis jam en la dua duono de la vivo. Tiu tempo, kiam la plejmulto el la cikatroj akumuliĝas, estas la tempo, kiam la aferoj vin observas en du manieroj, kaj vi devas reciproki al ili la rigardon kaj lasi ilin okazi.

Li vidiĝis kun la brovoj kunŝovitaj kvazaŭ disfadeniĝinta butontruo. Se iu hazarde kuraĝintus demandi, kio do estigis ĉe li tian geston de pendumoto, neniuj respondintus. Pri li oni sciis nur, ke en nebula tago de la deka monato li eliĝis el la trajno de la oka kaj tridek, kiu transportis brutojn kaj ĉiuspecajn varojn. La homoj lin vidintaj asertas, ke li ne portis bagaĝon, krom malnova ledjako kaj eta ŝultropenda tolsako simila al tiuj uzataj ĉe la armeo. La homoj de la gastejo ĉe la stacidomo, kie li petis pri loĝo, asertas, ke la sola propraĵo, kiun ili rimarkis ĉe li, estas trio da libroj tiel eluzitaj, ke ili ŝajnis tuj rompiĝontaj, flugontaj ĉe plej eta ventopuŝo. Liadire, li nomiĝis Aŭgusto. La familian nomon ili ne sciis skribi, ĉar ŝajne ĝi estis jankia. Kutime li pasigis horojn side sur benko de la dezerta stacidomo, absorbata de la legado de siaj libroj. De tempo al tempo oni vidis lin apogita sur unu el la palisaroj, kiuj ĉirkaŭbaris paŝtejojn, ekstaze observanta la sinpeladon de la bestoj. Malmultaj en la vilaĝo aŭdis lin paroli. Kiel sciante, silento kaj indiferento altiras al si la scivolon de la homoj pli ol vakaj babiladoj, kaj tiu silento tuj estis rigardata kiel disdego, kaj ŝprucis onidiroj, kaj iom post iom oni starigis ĉirkaŭ la fremdulo muron da klaĉoj, da fabeloj, da historioj varpitaj ĉirkaŭ vinglasoj kaj stulteco.

Tiuj homoj, kies sola okupo konsistas en tio vivi la vivojn aliulajn, fabelis tiom, ke, parolante pri li, jam neniuj certis pri siaj asertoj. Kaj oni eĉ ne memoris, kiel kaj kiam li alvenis. Iu eĉ diris, ke tiun homon tien kunprenis la diablo en unu el tiuj matenoj, en kiuj la nebulo kaŝas la domojn kaj stompas la pejzaĝon. Oni diris pri li tiom da aferoj, oni elpensis pri li tiom da, ke iujn timigis eĉ proksimiĝi al li. Unuj asertis, ke apud li ĉiam blovas frida vento; aliaj, ke ili vidis lin paroli en solo, sendube kun la diablo. Tiel la ŝajnoj kaj la stulteco de la homoj, kiuj lasas sin kapti de la plej flagrantaj flagoj, igis kreski obskuran ondon da timo, kiu minacis droniĝi ilin.

Ili kune mortkondamnis lin, lotis por scii, kiu devis esti la ekzekutisto, planis la manieron mortigi lin, la kiamon kaj la kieon.

Ĉio estis antaŭvidita. Malsaneca ĝojo trairis la korojn de la homoj. Endis fari justecon, defendi sin. Sur la Platnazulon falis la loto lin kapti kaj kunpreni sur la plej altan holmon. Tie oni pendumus lin je centjara verda kverko, kiu jam antaŭe kontemplis pli da mortigoj.

En la difinita tago, la Platnazulo supreniris la ŝtuparon de la pensiono krakigante siajn botojn kiel homo faranta anoncon per laŭtparolilo. La vilaĝo staris en silento, kvankam murmuro surda, kvazaŭ de flanktirata kurteno, filtriĝis tra la stratoj, kaj kelkaj hundoj hurlis priflarante la morton. Alkroĉita al sia poŝtranĉilo, la Platnazulo piedfrape malfermis la pordon de la ĉambro. Li iris tre kolera! En la duonombro, li ne distingis iun ajn korpon, neniu moviĝis, kaj, kiam liaj okuloj kutimiĝis al la obskuro, li vidis nur jakon kun nedifinita koloro kaj kelkajn vestojn ĉe la piedo de la lito. Nenion plian. Tie estis eĉ ne spuro de la fremdulo.

En la ĉambro neeksplikeble fridis kaj, kvankam la fenestreto vidiĝis tute fermita, malpura kurteno skuiĝis enaere.

Neniu revidis lin plu. Dum monatoj oni planis rastadojn por ĉasi lin, sed ili ne trovis ajnan spuron.

Nur vojaĝanto, kiu kelkajn monatojn poste, en iu tago kun densa nebulo, alvenis en la trajno de la oka kaj tridek, vestita per ledjako, havante kiel багаĝon nur tolsakon similan al tiuj uzataj en la armeo, trovis sur benko de la stacidomo tre olda libron verkitan en nedeĉifrebla idiomo.

Cristina Díez

LA FUĜO

La fadenoj tranĉiĝis pro neeksplikebla forto. Kiam la pordoj de la trajno malfermiĝis, mi kaptis la okazon kaj elsaltis. Mi estis simpla rompita marioneto, kiu kuris serĉe de la lumo, de la odoro je somero.

Mi alvenis spirmanka, sed ĝustatempe por elĵeti mian lastan deziron surŝtiparen. Ĉiuj faris same, ĉar ili pensis, ke tiel la deziroj plenumiĝos.

Kelkaj najbaroj preparis kradrostafojn. La plej olda virino dancis senŝua ĉirkaŭ la fajro, dum ŝi ridis. Mi vidis lin proksimiĝi trans la fumo. Mi ne povus elteni reveni al li. Ankoraŭ mi ne scias, kial li transloĝiĝis al tiu alia griza strato kun altaj konstruaĵoj. Mi ne scias, kial ĉiuvespere ni eliris al lia frida trotuaro por ke mi ludu supozan melodion ĉe tiu eta piano, dum kelkaj pasantoj ĵetis monerojn.

Mi atendis, ke li ŝanĝu opinion, ke li lasu min resti en lia olda kvartalo, sed li antaŭeniris plue kun la simpla celo ĉasi min. Senhezite mi saltis surŝtiparen.

LASTA-HORO NOVAĴO PRI ESPERANTA MUZIKO (VINILKOSMO)



Tiu ĉi dua albumo, titolita *Amindaj amas vin*, enhavas 11 kantojn originale verkitajn en esperanto de **Jaime Ginarte Díaz** kaj **Julián Hernández Angulo**, kaj muzike aranĝitajn de **Carlos Rafael Lolo Mendoza**.

La albumo estas respondo al ĉiuj kiuj pensis ke Amindaj estas nur projekto sen estonteco. La kantoj havas variajn temojn: invito serĉi la amon ĉar ĝi ekzistas kaj povas esti ĉie; anekdotoj pri okazaĵoj inter havananoj kaj santiaganoj kiuj montras ke ne gravas kie oni loĝas, gravas nur la sentoj kaj ke ni ĉiuj estas kubanoj; jesa respondo al diversaj malagrabraĵoj kiuj ofte okazis al Amindaj; alvoko por daŭrigi ĉiam antaŭen; kaj ke plorado ne solvas

problemojn.

Enestas omaĝa kanto de Amindaj al nia kara **Ludoviko Lazaro Zamenhof**; invito marŝi tra la bela kaj longa esperanta vojo; kaj ankaŭ alvoko paroli esperanton ĉar ĝi estas la lingvo por tutmonda komunikado.

Virtuala albumo 11 titoloj
Disponebla laŭ MP3 – 320 Kb/s kaj OGG formatoj.

Post longa silenta tempo, **SoloTronik** atakas denove.

Post multe da bataloj en kaj ekster la esperanta movado, alvenis multe da ŝanĝiĝoj: akiro de novaj teknikaĵoj, kaj samtempe pripensoj por renovigi la "sukcesajn" kanzonojn de la tronika repertuaro, t.e. tiuj kanzonoj kiuj atingis precipe sukcesajn kritikojn de 1990 ĝis 1999. Temas pri versioj de tiuj malnovaj kanzonoj, sed tute renovigitaj uzante novajn teknikaĵojn kaj ankaŭ adaptitaj al novaj muzik-stiloj kaj ritmoj.

La tekstoj de la albumo estis influitaj kaj inspiritaj dum tralego de la libroj *Ibere Libere kaj Ekstre-moj* faritaj de la Ibera skolo.

SoloTronik en ĉi tiu albumo estas:
-Henriko Gutierrez: Sintezilo, voĉo
-Julius Senmove: aranĝoj, drummaŝino

Virtuala albumo 10 titoloj
Disponebla laŭ MP3 Kb/s kaj OGG formatoj.



